

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2020-01-15 ĝis 2020-04-15.

Aktuala komuniko de la Estraro de ILEI : neniu fizika kunveno okazos julie en Kebekurbo Kanado.

(pri virtualaj eventoj rigardu malsupren)

Malgraŭ la nunaj tristaj cirkonstancoj, la vivo de la Ligo tamen plu iras!

Eventoj

La Estraro

Marte estis finfarita la dua varianto de la buĝeto de ILEI. La unua estis preparita antaŭ la kongreso en Serbio en 2019. Pro manko de kvorumo ĝi ne estis voĉdonita. Krome, ĝi prezentis deficiton. La Estraro esploris pri eblaj solvoj kaj, laŭ la sugesto de la kasisto William Harris, proponis, ke la kvara numero de *Juna Amiko* aperu nur rete. Tiel ILEI ŝparos la printadon kaj la afrankon. Kaze de la aprobo kaj realigo de tiu propono, la defcito malaperos kaj la pozitiva saldo estos 285 EUR. La du variantoj de la buĝeto estis proponitaj al la Komitato por reta diskuto kaj aprobo. Aprile dum la diskutfazo aperis propono de Didier Janot el Francio pri tria varianto. Nuntempe kuras la reta voĉdonado de la Komitato.

La 2020/03/08 la Prezidantino Mireille Grosjean sendis mesaĝon okaze de la Internacia Virina Tago. En ĝi ŝi substrekis valoron de Esperanto kiel lingvo por justa egala internacia komunikado, inkluzive de virinoj. Notindas, ke la nuna estraro de ILEI konsistas el kvar virinoj kaj tri viroj.

La 21-an de marto okaze de la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio, estis dissendita komuna Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio UEA kaj de ILEI, pri ebla rolo de Esperanto kaj de tiuj du organizaĵoj en solvado de tiu tutmonda problemo.

Marte-aprile okazis detala trarigardo de la membrolisto de ILEI flanke de la Estraro, nome de la Prezidantino Mireille Grosjean, la vicprezidanto Ivan Colling kaj Sebastian CYPRYCH, la ILEI - komisiito pri membropriizorgado. La celo de tiu tralegado estis aldoni plej multe da retadreso de niaj membroj.

Komence de aprilo okazis diskuto pri novaj kandidatoj por Honoraj Membroj de ILEI por 2020. Ne venis proponoj de la sekcioj antaŭ la 31-a de marto; la Prezidantino Mireille Grosjean proponis du personojn: Germain Pirlot, fama belga eminentulo kaj Zlatko Tišljarić, ne malpli konata kroata aktivulo. La Komitato voĉdonos pri tiu propono.

Fine de marto la Prezidantino Mireille Grosjean dissendis tra la kanaloj de ILEI la Apelacion de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj António Guterres rilate al la nuna monda situacio.

Samtempe Mireille Grosjean sendis salutmesaĝon al la Esperanto-grupo en Edinburgo, Skotlando, la loko de la sekva ILEI-kongreso en 2021.

La prezidanto Mireille Grosjean devis reprezenti la Ligon ILEI en la kunsido de la Fondaĵo Esperanto-Urbo Herzberg la 7-an de marto. Vojaĝo nuligita pro la pandemio. Ŝi devis prelegi okaze de la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Vojaĝo nuligita, du prelegoj de Mirejo okazos por la Reto.

La Komitato

Marte okazis traktado pri la nova varianto de la buĝeto de ILEI por 2020 kaj aprile komenciĝis la reta voĉdonado. Estas tre aktuala afero pro la neatendita monda situacio. Poiome daŭras en la sekcioj la preparado al elektoj de novaj komitatanoj.

Sekcioj

Survojas la preparado de la Raportaro de ILEI-sekcioj. Ĉina kaj belga sekcioj de ILEI nomumis novajn komitatanojn. La Estraro petas ĉiujn aliajn sekciojn same aktivigi la laboron en tiu kampo.

Projektoj

Por la decembra Tago de la Libro “Komuna legado” Mireille Grosjean proponis poemon de JULIA SIGMOND, hungardevena rumana civitanino, emerita pupaktorino, konata Esperantoverkistino, kiu mortis la 23-an de marto en norda Italio. Do, legado okazu omaĝe al ŝia poresperanta agado!

Eldonado

Granda laboro kuras nun, sub la gvidado de D-ino Katalin Kovats. Temas pri nova eldono de la “Manlibro pri Instruado de Esperanto”. Kunlaboras Ivan Colling, la vic-prezidanto de ILEI, kune kun sia edzino Rita, kaj aliaj provlegantoj.

Pro la fakto, ke ekzistas granda stoko de unu volumo de la instruilo “Tendaraj Tagoj”, ILEI skizis planon reeldoni la duan volumon de la instrumaterialo de S. MacGill. Survojas preparlaboro kunlabore kun la aŭtoro, cele al vendado de ambaŭ kune.

Kapabligo

Fine de marto estis dissendita la Gazetara Komunikado de UEA kun alvoko aliĝi al la projekto de ILEI kaj aliaj “Unu leciono pri Eo por ĉiuj lernejoj”. Ĉe la paĝaro de la Ligo troviĝas ĉiuj bezonataj instru- kaj metodikaj materialoj en pluraj lingvoj. La saman alvokon publikigis edukado.net, la partnero de ILEI. La Estraro invitas ĉiujn instruistojn sekvi tiun bonan okazon disvastigi Esperanton! La persono, kiu prezentu la lingvon al klasoj, ne nepre devas esti esperantisto!

Universitata agado

Sukcese disvolviĝas kaj plikonkreteĝas laboro de la Laborgrupo pri universitata agado de ILEI/ESF/UEA/TEJO. La grupo planis kelkajn projektojn, kreis koncernajn subgrupojn kaj nomumis gvidantojn por ĉiu el ili:

- Kolektado kaj publikigado de unupaĝaj resumoj de sciencaj artikoloj pri Esperanto kaj interlingvistiko (Angela Tellier)
- Pliutiligo de la nove kreita formularo de edukado.net por registrado de universitataj kursoj (Katalin Kovats, ILEI)
- Manlibreto pri esplorado de homa konduto (Vicente Manzano Arrondo)
- Esploro pri universitatnivela instrulibro pri interlingvistiko (Renato Corsetti)
- Plimultigo de kursoj de Esperanto aŭ Interlingvistiko (Renato Corsetti, ILEI) inkluzive de motivado per filmitaj intervjuoj kun sukcesaj instruistoj (Katalin Kovats)
- Studentaj E-kluboj en Universitatoj (TEJO)
- Rekreado de kolekto de la revuo “Simpozio” (Fernando Pita)
- Universitata agado en Afriko (Vicente Manzano Arrondo)
- Utiligo de la programaro Open Journal System por krei sciencajn retrevuon en Esperanto (Vicente Manzano Arrondo)

La ILEI-estraro prikonsideris tiun laboron kaj donis sian subtenon.

Pli detale eblas legi ĉe la paĝo

https://www.ilei.info/agado/universitata_agado.php,

kiun kreis kaj plu aktualigas Radojica Petroviĉ (enhave) kaj Jozefo Nemeth (teĥnike)

Resumaro de la Scienca konferenco

Fakultato de Teknikaj Sciencoj en Ĉaĉak (apartenanta al la Universitato de Kragujevac, Serbio) publikigis en sia retejo trilingvan resumaron

http://ftn.kg.ac.rs/konferencije/lvc2019/BookofAbstractsLVC_final.pdf (ISBN: 978-86-7776-239-1) de la Internacia Scienca Konferenco: Lernado en Virtualaj Komunumoj

organizita de la Fakultato kunlabore kun ILEI, enkadre de la pasintjara 52-a Kongreso de ILEI, kun partopreno de esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj, ĉefe universitatoj, el deko da landoj. La laborlingvoj estis la angla, la serba kaj Esperanto, kun sekva interpretado.

La prezentitajn prelegojn aprobis la Scienca Komitato, kiun kunprezidis Duncan Charters flanke de ILEI kaj Danijela Milošević, dekanino de la Fakultato. Kunprezidantoj de la Organiza Komitato kaj kunredaktoroj de la Resumaro estis Milica Stojković, asista profesorino de la Fakultato, kaj Radojica Petroviĉ el ILEI.

Krom la prelegoj, en la konferenca programo okazis du atelieroj, kiujn gvidis Radojica Petroviĉ:

- "La mondo tra infanaj okuloj": IT kaj Esperanto en interkultura komunikado de lernantoj

- Enkonduka kurso: Esperanto por komencantoj

kaj diskutrondo, kiun gvidis Marija Blagojeviĉ, asocia profesorino de la Fakultato

- Atingoj kaj limoj de instruado kaj lernado en virtuala medio

La resumaro estis katalogita kaj KD-e deponita ĉe la Nacia Biblioteko de Serbio. Mireille Grosjean disponigis paperajn versiojn al la arkivejo de ILEI en Herzberg, Germanio, kaj al kvar bibliotekoj, nome Roterdamo Biblioteko Hodler, La Chaux-de-Fonds CDELI, Vieno Kolekto de Planlingvoj kaj Zaozhuang Esperanto-Muzeo.

Regule aktualiĝas la informo pri la universitata agado en la paĝaro de ILEI

https://www.ilei.info/agado/universitata_agado.php/

Kongresoj

Ĉu virtuala kongreso, ĉu prelegsemajno, en kiu formo ni kunestos en julio 2020?

Premisoj kaj unuaj provoj estis jam faritaj en Serbio pasintjare dum la 52-a kongreso kun la temo "Lernado en virtualaj komunumoj". La Estraro urĝe pritaksas la aferon kaj organizas je 2020-04-18 specialan retan estrarkunsidon pri tiu temo.

Venontaj kongresoj

Daŭras kontaktoj inter la Estraro kaj LKK pri preparo al la Kongreso 2021. Januare la Estraro definitive decidis pri la kongresloko por 2021. En Edinburgo formiĝis LKK kaj komenciĝas preparlaboro. La estraro devos baldaŭ decidi, ĉu ĝi sekvas la estraron de UEA irante al Kanado en 2022 por kongresumi. La gastigantoj en Kebekurbo esprimis sin pozitive pri tiu plano.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Fine de marto pro la problemoj kun sendado eksterlanden de kelkaj revuoj pro la pandemio, la Estraro decidis, ke la unua numero de IPR estu libere alirebla vaste tra la tuta mondo. Krome, la Estraro pritaksas la eblan evoluon de la situacio ĝenerale kaze de poŝtŝervaj paneoj. Al tiu demando same estos dediĉita la estrarkunsido.

Juna Amiko (JA)

Same kiel kun IPR, fine de marto la Estraro decidis, ke la unua numero de *Juna Amiko* 2020 estu libere elŝutebla en la paĝaro de ILEI www.ilei.info. Krome, daŭras diskuto pri evoluo de la revuo. La Estraro diligente taksas ĉiujn opiniojn kaj serĉas la plej taŭgajn solvojn por kontentigi ĉiujn koncernulojn.

ILEI en la Reto, informado pri la Ligo

La Estraro zorgas, ke retaj komunikkanaloj regule kaj diligente pleniĝu per novaj kaj freŝaj informoj. Komuna informilo nomata “Esperiga Komunikado” “EKO” de UEA kaj ILEI regule informas la movadon vastskale. Stefan MacGill kune kun Mireille Grosjean zorgas pri trafa kaj abunda enhavo.

Kunlaboro kun UEA

La Estraro de ILEI atente sekvas la strategion de UEA rilate al la situacio ĉirkaŭ la pandemio, por ke la du partneraj organizoj agadu kongrue.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

La Estraro pritaksas alvenintan proponon pri ludo pri komunikado. Temas pri propono el Montpellier, Francio, entrepreno Kosmopôle, kaj la ludo nomiĝas Komunikado kaj prezentas diversajn lingvojn.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:
Elena Nadikova
Prezidanto de ILEI:
Mireille Grosjean
2020-04-15